**ESTRARAN JARRAPORTON DE ILEI DE 2021-08 ĜIS 2022-7.**
**POR LA KOMITAT-KUNSIDO DE LA 10-A DE DECEMBRO 2022**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI de 2021-08 ĝis 2022-7.

**EVENTOJ**

**Kongresoj 2021**

La 54-a kongreso de ILEI bone sukcesis en la formo de la retinario VEKI-2. La 2-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI, fakte, okazis inter la 7-a kaj la 14-a de aŭgusto 2021. Ĉeestis 156 partoprenantoj el 42 landoj. Benino, kiu devintus gastigi la ĉeestan kongreson, restis en la fokuso dum la Nacia vespero kaj dank' al la interesaj prelegoj de afrikaj profesoroj. La kongresa temo estis: "Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj". Ĉefprizorgantoj pri la programo de VEKI-2 estis Marija Belošević (Kroatio) kaj Mireille Grosjean (Svislando). Marija ricevis ankaŭ premion de UEA pro sia nelacigebla laboro riĉigi la kulturan flankon de ILEI pere de la pretigado de kongresaj programoj kaj Tagoj de Lernado dum la pasintaj jaroj. Radojica Petrović kaj Ivan Colling prizorgis la organizadon de la simpozio. La teknika flanko estis en la kapablaj manoj de Unika kaj de ŝia teamo de volontuloj, kun la helpo de Luis Obando. La Zoom-konto de IrEA estis uzata por la kongreso.

Dum la kongreso estis elektita la nova estraro de ILEI (vidu sube).

**Kongreso-2022**

La 55a ILEI-Kongreso okazis tute virtuale kun la titolo "La 3-a Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI" (VEKI-3), de la 23a ĝis la 30a de julio 2022. La temo de la Kongreso kaj de la Simpozio estis: "Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado". Estis bedaŭrinde, ke la Kongreso ne povis okazi kiel planite en Kebekurbo, Kanado, pro la daŭraj malfacilaĵoj vojaĝi kaŭze de la kovima pandemio. Sed Kanado restis simbole nia ideala "sidejo", dank' al la prezentado de Kebekurbo fare de la prezidantino de ties LLK, Suzanne Roy. La virtuala kongreso estis granda sukceso de publiko, dank' al sia eksperimenta, pli publik-centra aliro, kiu donis la eblecon al la prelegontoj elekti la tempon de sia prelego aŭ diskutrondo laŭ la ĉefa cel-publiko, kiun ili volis atingi. Ĝi donis la eblecon ankaŭ al homoj, kiuj kiel ajn ne povintus iri al Kebekurbo pro ekonomiaj aŭ aliaj kialoj, senpage ĝui grand-skalan internacian Esperantan eventon. La ĉef-organizanto de la ĝenerala parto de VEKI-3 estis estraranino pri kongresoj Laura Brazzabeni kun la helpo de la vic-prezidantino Alessandra Madella.

La programo estis tre ampleksa: dum 8 tagoj estis 33 prelegoj fare de 33 prelegantoj, 8 diskutrondoj, 6 koncertoj kaj unu filmeto. Ĝi legeblas en la retejo (https://www.espero.ir/eo/veki-3/) speciale kreita de irana inĝeniero Hamzeh Shafiee, kiu ankaŭ dezajnis la elegantajn partopren-atestilojn. La Zoom-konto de IrEA estis uzata por la kongreso. La plejparto de la programeroj daŭre spekteblas ĉe la jutuba kanalo de UEA, UEAviva, kie ĝis nun ili entute ricevis 5 074 vidojn. Detalaj priskriboj de la tuta evento legeblas ankaŭ en *Internacia Pedagogia Revuo* (2022/3, "VEKI-3: jam kutima kongresformo!"), revuo *Esperanto* de UEA (2022/10, "VEKI-3: laŭdo de l' virtualeco"), *La Lampiro* (2022/4, "Virtuala kongreso de ILEI"), ktp.

**ILEI-Simpozio 2022: "Esperanto en dulingva kaj plurlingva edukado"**

La ĉef-organizanto de la Simpozio estis estrarano Fernando Pita, kun la helpo de Laura Brazzabeni kaj Alessandra Madella. Estis entute 13 akademi-nivelaj prelegoj. La ĉefa prelego de la simpozio estis fare de Fabrizio Pennacchietti, kiu enkondukis la koncepton de "lingva higieno" rilate al Esperanto kaj instigis interesan debaton. Krom elstaraj samideanaj prelegantoj, Olta Totoni el Universitato Lancaster en Britio kaj Du Xin el

Universitato Keio en Japanio prelegis respektive en la angla (pri Nasdaq de Anthony Burgess) kaj en la japana (pri internacia interkultura komunikado) kun traduko de Alessandra Madella, por la strategio de ILEI malfermiĝi al la ekstera akademia mondo.

**Kongreso-2023**

Pro la troa altiĝo de la kostoj en Massa (Italio), kie estis origine planita la kongreso, la estraro kaj la LKK fine decidis okazigi la ILEI-kongreson de 2023 fizike en Linjano Orsabla (itale: Lignano Sabbiadoro). Temas pri plaĉa ĉemara urbeto en multlingva regiono de norda Italio, sufiĉe proksime de Venecio, kun tre taŭga strukturo kaj bonvenigaj aŭtoritatoj. Laura Brazzabeni, ILEI-estraranino pri Kongresoj, kaj Brunetto (Bruĉjo) Casini, prezidanto de la LKK, jam vizitis la strukturon en Linjano (kun kiu ili jam kunlaboris dum antaŭaj kongresoj) kaj parolis kun la lokaj aŭtoritatoj. La kongresan logotipon dezajnis Alessandra Madella. Ekis ankaŭ la prepara laboro por okazigi samtempan kaj samlokan programon kun TEJO, kiu estas kunlaboreme progresanta de ambaŭ flankoj.

Aparte grave por ILEI estis, ke al la planita kongreso en Massa ligiĝis projekto de instruado de Esperanto en la lernejoj de la itala regiono Tuskanio, nomata “30 Oraj Horoj”. Bonŝance, Laura kaj Bruĉjo ankaŭ jam adaptis la instruan projekton, origine pensita por regiono Toskanio, al la novaj cirkonstancoj, varbante pliajn interesatajn homojn en la regiono de Linjano kaj en la najbaraj lokoj. Detale, la “30 Oraj Horoj” celas altigi la metalingvistikajn kapablojn de gelernantoj en italaj superaj mez-lernejoj. Rilate al tiu ĉi projekto, Bruĉjo zorgas precipe pri la rilato kun lokaj politikistoj kaj administrantoj, dum Laura kunordigas la didaktikan parton kaj la rilatojn kun la Itala Instituto de Esperanto, kies Ĝenerala Direktoro ŝi nun estas. Ni ne devas forgesi la gravan rolon de samideano Enrico Borrello, volontulo de la Nacia Biblioteko de Massa, en la lanĉo de la projekto mem. Krome, Alessandra Madella estas pretiganta sciencan dokumenton, kies unua parto estis jam montrata al la Tuskanaj lernejaj aŭtoritatoj, ricevante ilian intereson kaj subtenon por la projekto de la “30 Oraj Horoj”. Ĝi aperos libroforme ĉe EdiStudio kaj celas estonte ebligi similajn klopodojn en aliaj lokoj, ankaŭ ekster Italio.

## ORGANOJ DE LA LIGO

### La Estraro

La nova Estraro estis elektita dum la komitatkunsido de la 10-a de aŭgusto kaj oficiale eklaboris ekde la lasta tago de la kongreso 2021, post la normala malŝarĝo de la antaŭa Estraro sekve de la pozitiva rezulto de la financa kontrolo. Ĉiuj 8 kandidatoj estis elektitaj. Ahmad Reza Mamduhi fariĝis la nova Prezidanto, Elena Nadikova la nova Sekretario kaj Karine Arakeljan la nova Estrarano pri Financoj. En la sekvaj estrarkunsidoj estis definita la tasko-divido inter ĉiuj membroj de la nova ILEI-Estraro. Jen ĝi:

Prezidanto: Ahmad Reza Mamduhi, Irano: Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena Nadikova, Rusio: Lerneja Agado.

Estrarano pri Financoj: Karine Arakeljan, Armenio: Ekzamenoj

Vic-prezidanto: Alessandra Madella, Italio: Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri Kongresoj: Laura Brazzabeni, Italio: Lerneja agado.

Estrarano: Marija Jerković, Kroatio: Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando Pita, Brazilo: IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO, renovigado de la retejo kaj komunikiloj de ILEI.

Estrarano: Radojica Petrović, Serbio: Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado, renovigado de la retejo kaj komunikiloj de ILEI.

Dum la koncerna periodo, regule okazis virtualaj estrarkunsidoj pere de la Zoom-konto de IrEA kaj estis starigataj du novaj listoj por estrara komunikado. Dum siaj regulaj retaj kunsidoj la Estraro diskutis kaj solvis diversajn kurantajn aferojn. Inter ili: senpaga membreco por nepagipovaj ukrainiaj samideanoj (tio estis unuanime decidita); aktivigo de sekcioj kaj ilia laboro, helpo al ili flanke de ILEI; varbado de novaj membroj; pri komunik-kanaloj de ILEI; renovigo de la nuna retejo de ILEI kaj/aŭ estigo de nova retejo; jutuba kanalo de ILEI; ekzamen-sistemo ILEI/UEA, ktp.

Novaj estraranoj preparis dokumentojn por registrado ĉe la Komerca Ĉambro (KvK) en Roterdamo, Nederlando, kie situas oficiala sidejo de ILEI, por simpligi la sekvajn procedurojn pri la banko mem.

**Sekcioj**

Estraranino Marija Jerković, kun la helpo de Renato Corsetti, komencis kontakti la sekciestrojn de ILEI, ricevante respondojn, kiuj ebligas koni pli funde la staton de la ligo en siaj fundamentaj bazojj kaj pripensi manierojn por stimuli sekcian agadon. Sekve de tiu esplorado, evidentiĝis la kreskanta neceso doni pli da pezo al la sekcioj de ILEI por helpi la daŭripovan vivon de la Ligo.

**PROJEKTOJ**

**Komuna Legado**

En 2021 por celebri la Zamenhofan Feston – la 15-an de decembro, kiu estas ankaŭ tradicie la Tago de la Esperanta libro, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj proponis simbolan tutmondan legadon de la komenco de la libro *Hodler en Mostar* (2006) de Spomenka Štimec, fama esperant-lingva verkistino el Kroatio. *Hodler en Mostar* aperis en la kroata (2020) kaj korea (2021) tradukoj kaj estas nun tradukata ankaŭ al la japana. Tio estas romano verkita originale en Esperanto pri la vivo de la svisa pentristo Ferdinand Hodler kaj du el liaj pentraĵoj, kiuj malaperis. Li estis la patro de Hector Hodler, fama Esperanta pioniro kaj la fondinto de Universala Esperanto-Asocio. Tiu elekto estis ankaŭ omaĝo al la antaŭa prezidantino de ILEI Mireille Grosjean, kies familio, Robert, produktis pentriston, kiu estis rivalo de Ferdinand Hodler. Vidu la prezentadon de Mirejo pri tio: https://www.youtube.com/watch?v=g7rPHvygR8k&t=343s

**Premio La Torre**

Dank'al la subteno de familio La Torre, en septembro 2021 ILEI anoncis la trian Premion Maŭro La Torre, kiu honoras la karmemoran Prezidanton de ILEI. La premio konsistis el 500 eŭroj por la plej bona eseo en Esperanto pri temoj rilataj al esplorkampoj kiel Esperanto-instruado, interkulturo, komputila analizo de tekstoj ktp (Vidu: https://www.ilei.info/novajxoj/PREMIO_MAURO_LA_TORRE.php). Post anonco de la tria Premio en septembro 2021 venis ĝis la limdato por anonci sian intencon partopreni (la 1-a de januaro 2022) 3 proponoj kun taŭgaj temoj. Ni povas rimarki, ke la konkurso iĝis pli internacia en sia partoprenado. Alessanda Madella zorgis pri la bona disvolviĝo de la diversaj fazoj de la premio, precipe pri la kunmetado de la internacia akademia ĵurio kaj la rilatoj kun familio La Torre. Dum VEKI-3 okazis ceremonio por honori Nitta Takamichi el Japanio, kiu

gajnis per sia esplor-raporto “Instrumetodo por Esperanto-kurso bazita sur metakognado kaj aktiva lernado”. Renato Corsetti prelegis dum la ceremonio rememore al la kar-memora figuro de ILEI-prezidanto Maŭro La Torre kaj Nitta donis unu-horan lecionon pri sia noviga instru-metodo, kiu povos esti vaste imitata. Ĉeestis membroj de familio La Torre kaj ĵurianoj de la premio. Radojica Petrović lanĉis la ideon kolekti libroforme ĉiujn eseojn de Premio La Torre. Nitta Takamichi jam plenumis ĉiujn devojn de la gajninto, ĉar li jam sendis sian reviziitan esplor-raporton al 7 Esperantaj bibliotekoj tra la mondo, laŭ la projekto “Ni Savu Niajn Semojn” de ILEI. Li ankaŭ publikigis mallongan resumon de sia raporto en IPR 22/4.

**Esperanto-kurso en Senegalo**

Tiu projekto de UEA, ILEI, Afrika Komisiono de UEA kaj Senegala Esperanto-Asocio, sub la aŭspicio de la Kampanjo Hans Bakker, celas okazigi preparan E-kurson septembre-decembre 2022 antaŭ la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto. La koncepton ellaboris eks-prezidantino de ILEI Mireille Grosjean, en ĵurio eniris Ahmad Reza Mamduhi, prezidanto de ILEI, Alessandra Madella, vic-prezidanto de ILEI, kunordigos la laboron la Estraroj de UEA kaj ILEI.

**Esperanto-Kursaro "Tibor Sekelj" – Lernu Esperanton en via lingvo.**

La Estraro decidis oficiale subteni IrEA-projekton "Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj" (https://www.espero.ir/eo/kursaro/). La informo pri ĝi aperis en la retejo de ILEI. Kadre de tiu projekto jam ekzistas registraĵoj de elementa kurso de Esperanto en kelkaj lingvoj. Ekzemple, la kurso de Esperanto en la araba estas tre populara en la jutuba kanalo de ILEI: https://www.youtube.com/watch?v=tMVZKaVGvIk

**Homa Ĉeno**

Dum VEKI-3 estis ankaŭ lanĉita projekto de internacia Homa Ĉeno pri edukado, laŭ ideo de Maximiliano Garcia. 116 homoj el kvar kontinentoj partoprenis en la tri unuaj partoj kaj oni estas nun pretigantaj la kvinan por la fino de la jaro 2022. Ĉiuj, kiuj ŝatas instrui kaj lerni, povas partopreni. La celo estas organizi praktikan internacian agadon pere de Esperanto, laborigi kune esperantistojn kaj ne-esperantistojn kaj instrui al niaj membroj uzi modernajn komunikilojn por facila video-produktado, kiu povas helpi varbadon aŭ instruajn projektojn. Se vi volas partopreni, estas tre simple: prenu objekton larĝe rilatan al Esperanto kaj/aŭ al edukado pere de via dekstra mano el ekster la kadro, montru ĝin kaj transdonu ĝin al via dekstra flanko ekster la kadro. Eĉ saĝ-telefono sufiĉas. Bonvolu sendi vian horizontalan videeton al: ilei.kongresoj@gmail.com

**KAPABLIGO**

**Tago de Lernado**

Kiel kutime, nia samideanino Marija Belošević organizis la Tagon de Lernado dum UK en Montrealo, la 9-an de aŭgusto 2022 kun la temo "Instruado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj kaj regionoj" kaj la subtemo: “Pandemiaj spertoj kaj postpandemiaj tendencoj en instruado”.

**Forumoj**

Postsekvante la iniciaton de Mirejo, sub la gvido de Ahmad kaj Radojica la 8-an de oktobro 2021 sukcese disvolviĝis la 7-a Forumo de ILEI, uzante la Zoom-konton de IrEA. Entute 14 homoj partoprenis en libera diskutado pri la temo “Aktualaj spertoj pri la instruado de Esperanto en lernejoj”. La 9-a Forumo okazis en la 2022.04.01 kun la temo: “Ĉio pri ILEI-Sekcioj”. Ĝi enhavis enkondukajn vortojn de Renato Corsetti kaj

diskuton pri diversaj aspektoj de la temo. La 6-a de majo plia forumo okazis kun la debata temo: “Specifaĵoj de lernado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj, regionoj”. Sekvis elstara forumo de Ilona Koutny kaj Duncan Charters pri interkulturo. La forumoj estas tradicie okazoj, kie pridiskuti ĉefajn zorgojn de ILEI, kiel la lertigadon de profesiaj instruistoj kaj neprofesiaj instruantoj de Esperanto tra la mondo. La estraro bonvenigas la proponon de diversaj rilataj temoj kaj prelegontoj.

**Universitata agado**

En la ĉiumonataj retkunsidoj de la Universitata Laborgrupo, gvidataj de Renato Corsetti kun teknika subteno de IrEA, partoprenis el la estraro Ahmad Mamduhi, Fernando Pita kaj Radojica Petrović. La laborgrupo analizas la rezultojn kaj diskutas plupaŝojn. Universitat-nivela projekto realigita de la grupo estas IKIKO (Internacia Kongreso pri Interkultura Komunikado), iniciatita kaj gvidata de Vicente Manzano Arrondo - Viko kun subteno de la prezidanto de ILEI Ahmad Mamduhi.

Decembre 2021 kaj januare 2022 la Scienca Asocio de la Universitato de Tehrano pri Turisma Administrado okazigis seriojn da dulingvaj (en la persa kaj Esperanto) ret(sem)inarioj kun la titolo “Internacia retinariaro pri Turismo kaj Esperanto”. La organizantoj de la eventoj estas la Prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamduhi kaj IrEA, la ĉefa helpanto estis UEA. Flanke de ILEI, prelegis en la retinarioj la vicprezidantino Alessandra Madella, la estraranoj Laura Brazzabeni kaj Radojica Petrović, Luigia Oberrauch Madella, la sekciestro de la itala ILEI-sekcio, kaj Zsófia Kóródy, la estrino de ICH (Interkultura Centro Herzberg) kaj de la germana ILEI-sekcio.

**Eldonado**

La estrarano Fernando Pita kolektis kaj pretigis por eldonado longan libron de aktoj de la lastaj simpozioj de ILEI (2020-21).

Alessandra Madella, kune kun Luigia Oberrauch, tradukis kolekton de verkoj de la itala samideana kuracistino Antonietta Bernardoni kontraŭ la psikiatriigo de edukado. Komitatano Ermanno Tarracchini estas nun poluranta la tradukon por eldonado.

La estraro komencis pripensi, kiel plej bone uzi la ISBN-kodojn de ILEI.

***Internacia Pedagogia Revuo* (IPR)**

La skipo gvide de la redaktoro Jozefo Nemeth diligente laboris por regula eldono de la ĉefa organo de ILEI.

***Juna Amiko* (JA)**

Same *Juna Amiko*, kiu festas en novembro 2022 sian 50-jaran jubileon, plu aperis regule kaj kun interesa enhavo danke al la valora laboro de la redaktoro Stano Marcek kaj la skipo de la rubrikestroj.

**ILEI en la Reto**

De la fino de novembro 2021 Alessandra Madella iĝis la ĉefa prizorganto de la Jutuba kanalo de ILEI: “Esperanto + Edukado ILEI”, kreita de Mirejo en 2017. Alia prizorganto estas Aristophio Andrade Alves Filho (Brazilo). Ekde tiam multe kreskis la vidoj en la retejo, kiu komencis atingi iom pli junajn homojn kaj rekrei ekvilibron inter viraj kaj virinaj spektantoj (dum la antaŭan jaron la statistika publiko estis 100% virinoj pli ol 65 jaraĝaj). ILEi-membroj estas varme invititaj kontribui per siaj videoj pri instruado kaj diversaj Esperantaj agadoj.

Dank’ al la laŭdinda laboro de ILEI-membroj, daŭre aperas diversaj aktualaj informoj en kanaloj de ILEI en Fejsbuko, Jutubo, Tvitero, Telegramo, tra dissendolistoj, krom en la retejo mem.  ILEI strebas konigi ne nur la informojn pri siaj eventoj, sed pri instru- kaj kapabligaj iniciatoj kaj aranĝoj de aliaj siaj movadaj partneroj.

## KUNLABORO KUN ENMOVADOJ INSTITUCIOJ

### Kunlaboro kun UEA

ILEI kunlaboris kun UEA por kandidatigi la projekton “30 Oraj Horoj” (kiel projekton de ILEI) kaj la ekologian animacion “Kungfua Kunikleto” (kiel projekton de la Fondaĵo NingNa) por la Premio Hamdan de UNESKO. Alessandra Madella pretigis la necesajn dokumentojn, en la unua kazo kun Bruĉjo Kasini, Laura Brazzabeni kaj Enrico Borrello kaj en la dua kun Max Garcia, produktanto de la Kunikleto. La alia projekto kandidatita de UEA estis la renovigo de la retejo de Edukado.net. Ĉiuj Esperantaj projektoj estis inter la 50-kelkaj projektoj el 149 de la tuta mondo, kiuj sukcese trapasis la unuan selektan fazon de la Premio. Kaj la “30 Oraj Horoj” de ILEI ricevis la plej multon da poentoj inter la tri projektoj oficiale subtenataj de UEA. La sukceso de niaj tri projektoj garantiis multe da videbleco al la Esperanto-movado kaj pensigas pri pliaj manieroj kunlabori. Interesa diskutrondo pri tio kaj pri la rilato inter ILEI kaj UNESKO okazis dum VEKI-3, dank’ al la helpo de spertaj fakuloj.

La observanto de UEA ĉe ILEI dum tiu-ĉi periodo estis la Prezidanto de UEA, Duncan Charters, dum la observanto de ILEI ĉe UEA estis la Prezidanto de ILEI, Ahmad Mamduhi.

Suzanne Roy reprezentis ILEI dum la Movada Foiro de la Montreala Kongreso.

Daŭre regule aperadis informoj pri ILEI-eventoj en la UEA-komuniko EKO.

### Kunlaboro kun TEJO

Albert Stalin Garrido, kiu estas la nuna Prezidanto de TEJO, sin anoncis kiel observanto de ILEI, estis aldonita al la estrara listo kaj aktive partoprenis en kelkaj estrarkunsidoj. La prezidantoj de UEA, TEJO kaj ILEI ankaŭ havis renkontiĝon por komuna strategia planado kaj prezentis ties rezultojn dum VK-3. La kunlaboro kun TEJO pri la komuna kaj samtempa okazigado de la kongreso 2023 ekis jam de la tempo de la planado de la kongreso de Massa kaj seninterompe daŭras.

La observanto de ILEI ĉe TEJO en la koncerna periodo estis estrarano Fernando Pita.

Giovanni de Lucia reprezentis ILEI dum la Movada Foiro de la Junulara Kongreso 2022.

### Kunlaboro kun IFEF kaj BEMI

ILEI kunlaboradas kun Internacia Fervojista Esperanto-Federacio e Biciklista Esperantista Movado Internacia kadre de la ekologiema projekto VERDEN de Erasmus + KA2, dank’ al la helpo de Kosmo-strategio de Francesco Maurelli kaj Sara Spanò, membro de la germana sekcio de ILEI. Dum la unua ĉeesta renkontiĝo de la projekto en Parmo, Italio, la 21-22-an de novembro 2021, Bruĉjo Kasini prezentis al interesatan publikon la projekton “30 Oraj Horoj” de ILEI.

**KUNLABORO KUN EKSTERMOVADAJ INSTITUCIOJ**

**Kun UNESKO**

De la 9-a ĝis la 12-a de novembro la vic-prezidantino Alessandra Madella partoprenis en la 41-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo, kie ŝi reprezentis ILEI, kio jam iĝis bona tradicio en la eksteraj rilatoj de ILEI. La 11-an de novembro 2021, kadre de la 41-a Sesio, okazis Tutmonda Kunveno pri Edukado 2021. Tie partoprenis ankaŭ Maximiliano Garcia, kiu alparolis la publikon nome de ILEI. La filmeton pri tiu alparolo eblas spekti ĉe la Jutub-kanalo de ILEI (https://www.youtube.com/watch?v=5QomYe6LR28). La tagon antaŭe en tiu sama kunveno partoprenis la franca prezidanto Emmanuel Macron kaj aliaj prezidantoj kaj ministroj pri edukado. Matene de 2021/11/11 ankaŭ parolis aliaj ministroj kaj prezidantoj; posttagmeze alparolis nur reprezentantoj de ŝtatoj kaj du reprezentantoj de la civilaj socioj: feminista asocio kaj ILEI. Dum la fina faka kunsido pri edukado de Unesko la prezidantino de la asembleo denove menciis, ke du membroj de civila socio alparolis la asembleon en la antaŭaj tagoj. Rezulte la nomo de ILEI estos ankaŭ en la protokolo de la fina kunsido de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. Maximiliano Garcia kaj Alessandra Madella ankaŭ disvastigis materialojn rilatajn al la Kungfua Kunikleto kaj al "30 Oraj Horoj".

Informo pri tiu evento aperis en la *Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj "Esperanto por UN"* de Humphrey Tonkin (2021, n. 55).

Ekde 2022 la reprezentantoj de ILEI ĉe Unesko laŭ la listo en IPR iĝis Alessandra Madella, Didier Janot, Emmanuel Desbrières kaj Maximiliano Garcia.

**Kun FIPLV**

Daŭras la kunlaboro kun FIPLV – Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvaj, kies membro ILEI estas ankaŭ por 2022. La kontaktpersono de ILEI ĉe FIPLV estas la prezidanto Ahmad Mamduhi.

**Financa Aldono al la Jarraporto de ILEI**

Kiel estas jam dirite, la nuna estraro de ILEI estis elektita dum la Komitata kunsido de la 10-a de aŭgusto 2021, dum la virtuala kongreso VEKI 2. Ĝuste tiam Karine Arakeljan estis anoncita kiel la nova Estrarano pri Financoj. Ĉar la posteno estis transprenita meze de la jaro, sekvis iom malfacila transira periodo kaj fermo de la financa jaro 2021. Antau la ILEI kongreso VEKI 3 la financaj rezultoj por la jaro 2021 devis esti kontrolitaj de la membroj de Kontrola komisiono, sed eblis kontakti nur unu membron de la Komisiono.

Necesas mencii, ke auguste 2021 la financaj rezultoj por la jaro 2020 estis senditaj al la membroj de la Kontrola komisiono Sofia Mensen kaj Simon Smits. Samtempe estis proponite fari ŝanĝon en la konsisto de la Kontrola komisiono, konsiderante la aĝon de s-ro Simon Smits kaj maleblon kontakti lin. La nova kandidato estis Nvard Manveljan – profesia financisto kaj esperantistino el Armenio.

Tamen lastmomente oni sukcesis kontakti s-ron Smits kaj ricevi la subskribitan de li raporton. Tial la voĉdonado koncerne la nova membro de la komisiono jam plu ne okazis, kaj tiu demando restis nesolvita.

Do, pro la urĝeco de la afero la financaj rezultoj de ILEI por la jaro 2021 estis transdonitaj por la dua kontrolo al Nvard Manveljan, kiu subskribis la raporton de la Kontrola komisiono kune kun la unua kontrolisto Sofia Mensen.

Ni petas, ke la estimataj membroj de la ILEI komitato konsideru la prezentitan situacion kaj la eblecon akcepti Nvard Manveljan kiel la duan membron de la Kontrola komisiono kaj ankau akcepti la raporton por la jaro 2021.

**Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Vic-prezidanto de ILEI:
Alessandra Madella

Prezidanto de ILEI:
Ahmad Reza Mamduhi

2021-12-05